
仏教と反戦

Budhismo kontraŭ milito

島田昭博 / Simada Syohaku

バーのカウンターでにこやかにグラスを傾けている男の指は、いましがた相手の体を穴だらけにしてきた自動小銃の引き金を引いたばかり。一殺戮の犯行現場でこんなことができるのが戦争だ。数千キロ離れたところからそれを指揮している人間には死臭は届かない。戦争は異常な神経をもつことによってはじめて実現する。戦地から帰った者が心の病にさいなまれ、幻覚に操られるように犯罪を犯すのはいつものことだ。「戦争とはそういうものさ」。そこで話を止めてしまうのではなく、「だから、あつてはならない」というのが反戦の立場だ。

反戦の根拠として、仏教は不殺生戒を最初に掲げ、命を大切にす宗教だから、というふうに教義から始めるのはやめたい。世界のあらゆる宗教は同様の教えを説いている。仏教者の立場は、なぜ戦争が起きるのかを縁起の理法にもとづいて考え、明らかにしてゆくことにある。

戦争の原因として、人間の本性である憎しみをあげることもできよう。しかし、怨み返さないことによって怨みは静まるかもしれないが、戦争を止めることは難しい。「仏の顔も三度まで」の言葉は、騙された怒りに燃えたコーサラ国の軍が釈尊の親族の住むカピラ城を攻めるといふ物語に由来するが、

La fingroj de viro ridetanta, kiuj tenas glason ĉe tablo de drinkejo, ĵus puŝis ellasilon de aŭtomata fusilo, kiu ĉelarumis korpon de malamiko. Tian agon sur la sceno de masakrado ebligas ja milito. La odoro de mortinta korpo ne atingas la oficiron, kiu milojn da kilometroj for de tie komandas ĝin. Milito realiĝas nur per eksterordinara nervo. Revenintoj de batakkampo ne malofte suferas pro mensa malsano kaj krimas kvazaŭ halucinite. "Milito estas tia." Ne haltu ĉi tie, sed "tial ne estu tiel!" Tio ĉi estas la starpunkto de pacifismo.

Mi ne ŝatas komenci predikon pri la dogmo de budhismo, kiu antaŭ ĉio malpermesas mortigon kaj estimas vivon, por meti bazon de pacifismo. La starpunkto de budhano estas pripensi kaj klarigi, kial milito okazas, surbaze de la rezono de laŭkondiĉa estiĝo.

Oni povus citi malamon, homan naturon, kiel kaŭzon de milito. Sed, kvankam venĝemo eble povas kvietiĝi pro nevenĝo de alies flanko, estas malfacile haltigi militon. La proverbo "budha (milda) vizaĝo, ĝis la tria fojo" devenis de la anekdoto, ke la armeo de Kosalo trompita de la tribo Ŝakjo kolere atakis la landon Kapilavastu, kie loĝis la parencoj de Ŝakjamunio; tiam li antaŭdiris, "La tribo

そこでも最後に釈尊は「釈迦族の人びとは、今日、過去世の因縁がここに熟し、今その報いを受けて亡ぼされるであろう」と告げている。

現代の戦争は、怨恨よりもっと大きな力によって起こっている。それは国際金融資本という化け物である。これが、一国の政治や企業を動かしながら利益を貪り、その過程でおこされた摩擦の火花が戦争なのである。国どうしの経済のぶつかり合いによる戦争よりも、複雑化しているのである。何千兆円という金（かね）が利益を求めて世界中を駆けめぐっているのだから、これはどうしようもない大きな力だ。と同時に、こんな大きな金が利益を生み出し続けることなど不可能だし、それが破綻する過程も戦争の原因になる。

これに抗することは困難きわまりないけれど、あきらめないで、それぞれの立っているところでそれぞれのやり方で抵抗することで戦争をくい止めるしかないと考えている。

そのときの原理となるのが「共生」の理念ではないだろうか。ただ、共生とは、自分以外の他者と共に生きてゆこうというのではなく、他と見なしているものが実は自分の一部であると認識することである。自国と他国とは、自分の右足と左足が争ったら立ったり歩いたりできないのと同じような関係にあるのだ。

Ŝakjo estas pereigota pro la rekompenco de la pasinta ago, kiu kiel kaŭzo nun maturiĝas."

La moderna milito tamen okazas pro pli granda forto, nome de la monstro nomata internacia financa kapitalo. Ĝi movas ŝtatan politikon kaj entreprenon por avidi profiton; fajrero de konflikto kaŭzita de tiu proceso estas milito. La moderna milito estas multe pli komplika ol la milito pro ekonomia konflikto inter ŝtatoj. Miloj da bilionoj da enoj ĉirkaŭkuras tra la mondo por gajni profiton, do tio ĉi estas nebrideble granda forto. Kaj samtempe estas neeble, ke ĉi tiom granda mono daŭre naskadas profiton; iam devas okazi breĉigo, kiu mem fariĝas kaŭzo de milito.

Kontraŭstari tiun ĉi forton estas treege malfacile. Sed ne rezignaciante rezisti kontraŭ ĝi laŭ sia maniero sur sia starpunkto estas la sola rimedo haltigi militon, mi pensas.

La principo por rezistado verŝajne estas la ideo de "kunvivado". Kunvivado ne signifas la vivadon kune kun aliaj homoj krom mio, sed la konon, ke aliaj homoj verdire estas parto de mio. La rilato inter mia ŝtato kaj aliaj ŝtatoj estas tiel sama kiel tiu inter dekstra kaj maldeksta piedoj; se ili batalus unu kontraŭ la alia, nek starado nek irado eblus.

筆者：島田昭博（しまだ・しょうはく）

東京文京区の浄土宗光源寺住職。団塊の世代で、かつてはベ平連の運動に参加。山門には、エスペ란ティストである先代住職の弟の発案で、TEMPLO FONTO DE LUMOの寺院名の石板がはめ込まれている。